# BRAZILA ESPERANTISTO

58-A JARO SEPTEMBRO - DECEMBRO 1964 N.º 606-609

## Rio de Janeiro



*La nova terplenigaĵo en la kvartalo Glória.*

La 19-a Brazila Kongreso de Esperanto okazos en la oficiala kadro de la festoj memorigaj pri la 4-a jarcento de la urbo.

SEPTEMBRO-DECEMBRO 1964

58-a Jaro N.º 606-609

# BRAZILA ESPERANTISTO

("O Esperantista Brasileiro")
Oficiala organo de

**BRAZILA ESPERANTO-LIGO**
Societo de publika utileco, laŭ registara dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:
**A. CAETANO COUTINHO**

Respondeca redaktoro (redactor principal):
**D-ro CARLOS DOMINGUES**

Administracio kaj Redakcio:
**Praça da República, 54, 2.º**
Telefono: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio
RIO DE JANEIRO — BRAZILO
**Senpaga por anoj de B. E. L.**
Eksterlande: 15 steloj aŭ 10 respondkuponoj

**QUOTA ANUAL DE ADESÃO À LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO 1965**

**(De acordo com os Estatutos todos os membros são automàticamente filiados à organização mundial)**

| | |
|---|---|
| Membro simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantisto" .......... | 3.000 |
| Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista ................. | 7.000 |
| Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto" .................. | 14.000 |
| Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante .... | 21.000 |

Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 10 vêzes a quota dêste.

Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 20 vêzes a quota dêste.

Tôdas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

**LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**
PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
**Rio de Janeiro, GB**

## CURSOS POR CORRESPONDENCIA

A B. E. L. mantém Cursos por Correspondência de três graus com diplomas, conferidos em nome da Academia de Esperanto.

O CURSO ELEMENTAR (10 lições) ministra o conhecimento do Esperanto para as necessidades da vida quotidiana. Com o cartão de matrícula o aluno recebe o livro adotado e fica inscrito no Movimento com a categoria AM.

Contribuição única .. Cr$ 3.000

O CURSO SUPERIOR (15 lições) prepara para o emprêgo do idioma, com correção e justeza, em assuntos literários. Além da FUNDAMENTA KRESTOMATIO o estudante possuirá o PLENA VORTARO DE ESPERANTO e dicionários Esperanto-Português e Português-Esperanto.

Contribuição única .. Cr$ 5.000

O CURSO MAGISTRAL (20 lições), essencialmente técnico, destina-se sobretudo a professôres que desejem especializar-se no ensino da Língua Internacional.

Contribuição única .. Cr$ 10.000

A contribuição para cada curso é paga adiantadamente e de uma só vez. A taxa de exame final e diploma é igual à contribuição do curso respectivo.

PARA CURSO SUPERIOR

| | |
|---|---|
| Fundamenta Krestomatio ... | 8.000 |
| Plena Vortaro .............. | 8.000 |
| Esperanto sem mestre ...... | 1.800 |

*Remessas em cheque pagável à Liga Brasileira de Esperanto.*

La libro estas mutulo, kiu parolas; surdulo, kiu respondas; blindulo, kiu gvidas; mortinto, kiu vivas.

*Pastro Antônio Vieira*

# BRAZILA ESPERANTISTO

58-A JARO | SEPTEMBRO - DECEMBRO 1964 | N.º 606-609


# NOVA E GRANDIOSA AÇÃO

## PROPOSTA DOS ESPERANTISTAS ÀS NAÇÕES UNIDAS

Em Resolução de 19 de Dezembro de 1962 a Assembléia Geral das Nações Unidas decidiu proclamar o ano de 1965 "Ano da Cooperação Internacional". Nas Nações Unidas foi constituida uma Comissão Preparatória especial para tratar de diversos empreendimentos nesse ano. A Comissão dirigiu-se a diversas entidades não governamentais, que funcionam como órgãos consultivos, com o fim de pedir-lhes que contribuam para o Ano da Cooperação Internacional. A Diretoria da Associação Universal de Esperanto (U.E.A.) respondeu que a Associação mesma e tôdas as organizações nacionais e especializadas, ligadas a ela estão prontas para tomar parte em diversas atividades de acôrdo com as sugestões da Comissão Preparatória. A Diretoria da U.E.A. dará oportunamente conselhos às organizações nacionais e especializadas acêrca dos métodos de ação, em conformidade com os planos recebidos da Comissão Preparatória da ONU e com as suas sugestões eventuais ulteriores.

Esta, porém, é apenas uma das faces da questão. Para todo aquele que estudou com certa profundeza os diversos aspectos das relações internacionais contemporâneas, é evidente que a diversidade de línguas apresenta um dos mais graves obstáculos à maior intensificação e progresso da cooperação internacional em todos os campos. Desta forma, o Ano da Cooperação Internacional apresenta-se como ocasião propícia a fim de chamar a atenção da ONU, dos Estados-Membros e do público em geral para a solução que oferece a Língua Internacional. Antes de formular uma proposta concreta à Diretoria da U.E.A. sôbre êste segundo aspecto, o Secretário-Geral, Prof. Dr. Ivo Lapenna consultou em circular especial as associações nacionais e especializadas e os Membros da Comissão Executiva da U.E.A. A questão proposta na consulta consistia em saber se a U.E.A. deveria organizar uma campanha de escala mundial em favor do Esperanto e no caso afirmativo, se os respondentes estariam prontos a colaborar e auxiliar ao máximo para a realização da proposta.

Tôdas as respostas recebidas até o começo da reunião de Março da Diretoria — e também as respostas recebidas depois dessa data — foram afirmativas e muitas acrescentaram sugestões úteis.

Depois de larga permuta de opiniões a Diretoria decidiu unânimemente que não se podia deixar passar esta ocasião singular e que era necessário entrar em ação. Os vários pormenores do trabalho serão oportunamente comunicados a tôdas as associações nacionais, organizações colaboradoras, imprensa esperantista, estações de rádio e outras instituições.

O plano prevê a apresentação de memorandos à ONU e Estados Membros, esfôrços para interessar organizações nacionais e especializadas não esperantistas, intensificação dos trabalhos para incrementar o ensino do Esperanto nas escolas, campanha na imprensa mundial, em revistas, pelo rádio, pela televisão, por meio de conferências, exposições e diversas outras maneiras.

O ponto nuclear é uma proposta à ONU de resolver o problema da língua.

A Diretoria da U.E.A., cujos membros pertencem a diversas nações, está convencida de que o texto da proposta é adequado dos vários pontos de vista — nacional, político, religioso e outros, de sorte que tôda pessoa que aprove a idéia de Cooperação Internacional e compreenda o obstáculo de idioma pode sem nenhuma dúvida subescreve-la.

Só é necessário colher o maior número de assinaturas de pessoas pertencentes a qualquer profissão e ocupação desde os colegiais até os membros das Academias de Ciências ou, para ficar no âmbito das profissões qualificadas, desde os chefes de Estado até as donas de casa.

A Diretoria da U.E.A. decidiu que a petição seja apresentada em Esperanto e nas diversas línguas nacionais, encarregando desta última parte, as associações esperantistas. De acôrdo com essas instruções, a Liga Brasileira de Esperanto preparou o texto em língua portuguêsa, que é o seguinte:

*PROPOSTA*

*No Ano da Cooperação Internacional*

*Dando integral apoio aos esforços das Nações Unidas para o progresso da colaboração entre os povos com o fim de desfazer as tensões internacionais e para a consolidação da paz mundial; mas profundamente convencidos de que a diversidade de línguas representa um dos mais sérios obstáculos à maior intensificação e desenvolvimento da cooperação internacional neste campo; tendo em consideração a Resolução de 10 de Dezembro de 1954 pela qual a Conferência Geral da Unesco reconheceu "os resultados atingidos pelo Esperanto no domínio das relações intelectuais internacionais e na aproximação dos povos do mundo";*

*propomos que as Nações Unidas resolvam o problema da língua por meio de uma real e eficaz ajuda à difusão da língua Internacional neutra Esperanto, recomendando igualmente aos Estados-Membros que desenvolvam o seu ensino e estimulem o seu emprêgo nas relações internacionais dos povos.*

A Liga está distribuindo a todos os seus membros e associações filiadas as fôlhas de proposta, nas quais se lêem as instruções, que devem ser atentamente seguidas. Os que desejarem poderão pedir mais exemplares.

Estamos certos de que os esperantistas brasileiros empenharão a fundo os seus esforços para que a proposta à ONU se apresente com um número verdadeiramente considerável de signatários do nosso país, de modo que êste tenha nesse majestoso movimento uma posição relativa, não só à nossa grande população como tambem ao elevado apreço que a Língua Internacional conquistou no Brasil.

FÔLHA DE PROPOSTA À ONU .. Cr$ 10

# FORPASIS PORTO CARREIRO NETO



*Porto Carreiro Neto en sia laborejo de katedra profesoro.*

La Esperanto-Movado profunde funebras pro la morto de Porto Carreiro Neto. Li forpasis en Rio de Janeiro en la 21-a de Julio lasta, lasante grandan doloron al siaj samideanoj kaj malfacile pleniglebIan lokon en niaj vicoj.

Luís da Costa Ferreira Porto Carneiro Neto naskiĝis en Recife (Pernambuco) en la 7-a de Januaro 1895. Li apartenis al malnova familio, kiu havas branĉojn ne nur en Portugalujo, sed ankaŭ en Hispanujo kaj Belgujo, kaj kiu prezentas multajn konatajn militistojn kaj precipe eminentajn profesorojn. Lia patro, respektata universitata profesoro de juro, politika ekonomio kaj lingvoj, zorge gvidis lian edukadon. Nur dekkvarjara li fariĝis instruisto en la gimnazio direktata de lia patro. Lia plej maljuna frato, klera kuracisto kaj universitata profesoro, estis la enkondukanto de psikanalizo en Brazilo.

Translokiĝinte al Rio de Janeiro, Porto Carreiro Neto diplomiĝis en la Politeknika Lernejo kiel politeknika, industria- kaj mekanik-elektra inĝeniero. Li doktoriĝis pri Natur-scienco. Li estis nomita profesoro en la sama lernejo kaj post konkurso ankaŭ katedra profesoro de Neorganika Ĥemio en la Nacia Lernejo de Ĥemio de la Universitato de Brazilo.

En 1923, kondukita de nia pioniro Prof. D-ro Everardo Backheuser, li aliĝis al Brazila Esperanto-Ligo. Konsciante pri tio, ke laŭ la Deklaracio de la 1-a Universala Kongreso de Esperanto esperantisto estas tiu, kiu scias Esperanton, li tuj komencis studi ĝisfunde la lingvon, kiun post nelonge li regis kiel malmultaj. Li sukcesis perfekte koni la verkaron de Zamenhof, kiun li legis ĉiutage, ĉiam kun krajono en la mano. Rigora fundamentisto, li konstante konsilis al la legado de la libroj de Zamenhof.

Pri gravaj temoj de la lingvo li verkis artikolojn por *Brazila Esperantisto, Lingva Kritiko* kaj aliaj gazetoj.

Por Brazila Esperanto-Ligo li verkis jenajn librojn, eldonitajn de ĝi: *Principais Conquistas Mais Recentes do Idioma Auxiliar Internacional Esperanto* (Ĉefaj Pli Freŝdataj Konkeroj de la Internacia Helplingvo Esperanto) kaj *A Estrutura do Esperanto* (La Strukturo de Esperanto). Li kunverkis la grandan vortaron *Dicionário Português-Esperanto.*

Du liaj verkoj restis neeldonitaj: la traduko de la fama romano *Bugrinha,* kiun li esperantigis laŭ peto de la aŭtoro, la ŝatata verkisto Afrânio Peixoto, kaj kompleta studo pri la grava problemo de la participoj, kiun li verkis en 1936 kaj senĉese deziris reverki.

Brazila Esperanto-Ligo eldonis en 1941 lian bonegan tradukon de la romano *A Viuvinha* (La Vidvineto) de Alencar. Ekde 1953 li tradukadis la literaturan pecon prezentitan en ĉiu numero de Brazila Esperantisto sub la rubriko *Aperfeiçoe o seu Conhecimento* (Perfektigu vian Scion).

Plurajn librojn li tradukis por eldono de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko: *La Nova Erao — La Erao de la Tutmondeco — kaj Esperanto, Mesaĝo de la Espero, Por Iu Pli Bona Mondo,* kelkajn el la albumoj de brazilaj ĉefurboj kaj *Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo* (kelkaj ĉapitroj).

Manuskriptoj de diversaj aŭtoroj estis reviziitaj de li en atenta kaj amika kunlaboro, inter ili: *Curso de Esperanto en 20 Lições, Esperanto sem Mestre, Teatro* de Machado de Assis kaj *Antologio de Brazilaj Rakontoj,* kiu cetere enhavas rakonton tradukitan de li.

Brazila Spiritisma Federacio ankaŭ povis ĝui kelkajn notindajn tradukaĵojn, nome: *La Libro de la Spiritoj* (per kiu li ricevis premion en konkurso), *En Ombro kaj en Lumo, Antaŭ Du Mil Jaroj, Ago kaj Reago; Nia Hejmo.*

En 1932 li estis elektita al la Lingva Komitato kaj em 1949, kun la reformo de la Akademio de Esperanto li fariĝis Akademiano, kio li restis ĝis 1962.

Ne nur en la verkada kampo li montris aktivecon: li prezidis Brazilan Klubon "Esperanto", la plej grava loka asocio en Brazilo, de 1934 ĝis 1939; li plenumis la oficon de ĉefdelegito de UEA dum kelkaj jaroj, kaj dum du grandaj periodoj li estis ĝenerala Sekretario de B.E.L.

Multajn kursojn li gvidis; en klasoj, per korespondado kaj per radio. Al siaj lecionoj li ĉiam donis la saman severecon, kiel en sia katedro. Per tio li forte influis sur la instruadon kaj lernadon de Esperanto en nia lando. Ĝis kelkaj monatoj antaŭ sia morto li venis kun granda peno gvidi Profesoran Kurson en nia sidejo laŭ invito de Brazila Klubo "Esperanto". Kvankam li estis de longe malsana kaj eĉ preskaŭ ne plu marŝis, li senĉese laboradis por nia afero kaj vere lia morto venis neatendite.

Li povis fini la manuskripton por la 2-a eldono de *Dicionário Português-Esperanto*. En letero freŝdata li estis konfirminta, ke li faris tiun laboron laŭ komisio de B.E.L. kaj por ĉi tiu.

Poeto en la nacia lingvo kaj en Esperanto, li verkis plurajn belajn poeziaĵojn kun alta inspiro.

B.E.L. per sia Estraro kaj aliaj membroj sin reprezentis en la enteriga ceremonio kaj en la funebra meso.

Inter la multaj kondolencoj ricevitaj de B.E.L. troviĝas tiu de la Prezidanto de la Akademio de Esperanto, Prof. G. Waringhien, kiu akcentas la eksterordinaran meriton de la mortinto kaj kiu komunikis la malĝojigan fakton ĉe la kunveno dum la 49.ª Universala Kongreso de Esperanto en Hago.

Brazila Esperantisto ripetas al la familio de nia neforgesebla kunbatalanto la esprimon de nia sincera sento.

# O Novo Presidente de U.E.A.

Durante o IL Congresso Universal de Esperanto, em Haia, foi eleito Presidente de U.E.A. o Prof. Dr. Ivo Lapenna.

Todo o mundo esperantista pode regozijar-se por êste fato, pois os méritos do Prof. Dr. Lapenna são grandes e muitos. A sua posição fora do Movimento e o seu conhecimento do problema da língua nas relações internacionais asseguram a mais competente orientação.



O Dr. Ivo Lapenna nasceu en Split (Dalmácia) em 5 de Novembro de 1909. Seu pai era engenheiro e sua mãe conhecida pianista. Fêz os estudos ginasiais em Split e o curso jurídico em Zagreb. Doutorou-se em 1932 apenas com 23 anos. Depois exerceu a advocacia.

Aprendeu o Esperanto em 1928 e em 1937 foi feito Presidente da Liga Iugoslava de Esperanto; nesse pôsto muito contribuiu para o progresso do Movimento Esperantista da Iugoslávia. Escreveu um manual en croata, *Esperanto u 10 lekvija* e dirigiu diversos cursos. O Dr. Lapenna foi eleito Membro da Comissão Executiva e Membro da Diretoria de U.E.A. em 1938. Logo depois da guerra tornou à atividade no Movimento Esperantista.

O Dr. Lapenna foi nomeado professor de Direito Internacional e de História Diplomática da Universidade de Zagreb e foi convidado em 1946 a tomar parte na Conferência da Paz em Paris. Também funcionou como advogado perante a Côrte Internacional de Haia em 1947 e 1948. Em 1948 foi eleito Membro da Academia Iugoslávia de Ciências e Artes en Zagreb.

Em 1949 deixou a Iugoslávia e passou a residir como refugiado, primeiro em Paris e depois em Londres. Foi feito Membro da *Académie Internationale Libre des Lettres* e da *International Law Association*. A instituição científica francesa *Centre National de la Recherche Scientifique*, da qual é colaborador, incumbiu-o de preparar a obra *Conceptions Soviétiques de Droit International Publique*. Tôdas as importantes revistas especializadas em Direito Internacional elogiaram essa obra pela sua objetividade.

De Paris foi para Londres; aí tornou-se colaborador da seção de Estudos Internacionais na *The London School of Economics and Political Science* da Universidade e preletor de Direito International. Por incumbência dessa instituição escreveu um amplo estudo sôbre tema especial.

Apesar das suas enormes ocupações em outro campo, êle voltou a dedicar-se ao Movimento Esperantista Internacional. Como Diretor da Seção de Congressos reorganizou a Universida-

de Internacional de Verão, lançou as bases do Serviço de Imprensa dos Congressos que funciona durante o ano inteiro e introduziu os Concursos de Literatura e de Oratória.

O Dr. Lapenna reorganizou o Serviço Internacional de Informações, construiu uma rêde de colaboradores nacionais e nunca deixa de estimular a trabalho mais intenso. O Centro de Pesquisa e Documentação, uma das mais importantes instituições do Movimento, foi por êle fundado em 1952. O Dr. Lapenna conseguiu em tempo admiràvelmente curto colecionar grande quantidade de documentos e deu ao Centro uma base de pesquiza científica.

Depois do extraordinário triunfo em Montevidéo seguiram-se os preparativos do ano Zamenhof. O Dr. Lapenna não se satisfaz com os êxitos alcançados, mas prossegue no trabalho e pela sua persistência anima também os outros.

O Dr. Lapenna é autor de diversas obras de alto valor no terreno da documentação em Esperanto: *La Internacia Lingvo (Faktoj pri Esperanto)*, *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo* e outros. *Retoriko* é uma das leituras mais apreciadas por muitos esperantistas. As suas obras caracterizam-se pela objetividade, pelo estilo claro e pelo irrepreensível Esperanto.

O Dr. Lapenna é Membro da Academia de Esperanto e, o que decerto muito poucas pessoas sabem, excelente violoncelista.

Viajando em 1954 para a conferência da UNESCO em Montevidéo e no seu regresso, o Dr. Lapenna visitou o Rio de Janeiro, trocando idéias com os esperantistas brasileiros sôbre o Movimento e aqui fazendo vários amigos.

Damos abaixo, no original, a carta que a Liga Brasileira de Esperanto dêle recebeu em resposta às congratulações que lhe dirigiu pela sua eleição.

*Tre estimata kaj kara Profesoro Domingues.*

*Tutkoran dankon pro viaj gratuloj okaze de mia prezidantiĝo en UEA. Kiel antaŭe, tiel same en la estonteco mi klopodos fari mian eblon por disvastigi Esperanton kaj por altigi kiel eble plej multe la prestiĝon de la Esperanto-Movado. Mi estas konvinkita, ke en tiu laboro mi ĝuos la apogon de ĉiuj niaj organizaĵoj kaj de ĉiuj agemaj esperantistoj. Tiurilate via Ligo povas ludi aparte gravan rolon, ne nur tial, ĉar ĝi estas la plej forta landa organizaĵo en ambaŭ Amerikoj, sed ankaŭ ĉar ĝi apartenas al unu el la plej elstaraj en la mondo.*

*Mi petas vin, estimata Profesoro Domingues, transdoni al la tuta brazila esperantistaro mian tutkoran dankon pro la gratuloj kaj mian varman peton intensigi la laboron por Esperanto, tute speciale en la Jaro de Internacia Kunlaboro, kiu prezentas unikan eblecon por efika agado por nia afero.*

*Kun multaj bondeziroj kaj tre koraj salutoj,*

*sincere via*

*Ivo Lapenna*

**LETEROJ**

**A tragédia da vida de Zamenhof revelada pela sua correspondência recentemente descoberta. Apresentação e comentários do Prof. G. Waringhien.**

**2 volumes enc. .............. 60 st.**

**1 st. = Cr$ 200 (Dez. 64)**

# ACADEMIA DE ESPERANTO

Em Junho último realizou-se a eleição para a renovação parcial do quadro da Academia de Esperanto. Os atuais Membros, são os constantes da seguinte lista, segundo a classificação das línguas feita pelo Presidente da Academia:

## LÍNGUAS LATINAS

*Catalão*
D. DALMAU, Barcelona, Espanha

*Espanhol*
Prof. J. RÉGULO PÉREZ, La Laguna de Tenerife, Canárias.

*Francês*
Dr. A. ALBAUT, Toulouse, França.
R. BERNARD, Bois-Colombes, França (N).
Prof. G. WARINGHIEN, Choisy-le-Roi, França.

*Italiano*
LA COLLA, Milão, Itália.
Dra. Cl. CONTERNO G., Turim, Itália (N).

*Português*
Prof. Dr. C. DOMINGUES, Rio de Janeiro, Brasil.

*Romeno*
S. PRAGANO, Amsterdam, Holanda.

## LÍNGUAS GERMÂNICAS

*Alemão*
Eng.º A. R. HAFERKORN, Berchtesgaden-Gern, Alemanha.
Th. A. K. H. JUNG, Scheveningen, Holanda.
Dr. W. LIPPMANN, Hamburgo Alemanha.
Dr. W. A. SOLZBACHER, Washington, Estados Unidos.

*Dinamarquês*
Prof. Dr. P. NEERGAARD, Copenhague, Dinamarca.

*Holandês*
F. A. F. FAULHABER, Amsterdam, Holanda.
H. A. DE HOOG, Amsterdam, Holanda.
Eng.º J. R. G. ISBRUCKER, Haia, Holanda.

*Norueguês*
R. E. BUGGE-PAULSEN, Oslo, Noruega.
J. H. ROSBACH, Sarpsborg, Noruega.
C. STOP-BOWITZ, Oslo, Noruega.

*Sueco*
K. SODERBERG, Uppsala, Suécia.
K. E. VILBORG, Goteborg, Suécia.

## LÍNGUAS ESLAVAS

*Búlgaro*
A. D. ATANASOV, Sofia, Bulgária (N).
I. KRESTANOV, Sofia, Bulgária.

*Checo*
T. PUMPR, Praga, Checoslováquia.

*Esloveno*
R. RAKUŜA, Maribor, Iugoslávia.

*Polonês*
T. HODAKOWSKI, Nowy Sacz, Polônia.

*Russo*
Prof. Dr. E. BOKAREV, Moscou U.R.S.S.
Prof. Dr. S. V. OBRUĈEV, Leningrado, U.R.S.S. (N).

*Sérvio-croata*
Prof. Dr. I. LAPENNA, Wembley, Inglaterra.
I. ROTKVIĈ, Zagreb, Iugoslávia.

## LÍNGUAS FINO-UGRIANAS

*Finlandês*
V. S. SETÄLÄ, Helsinki, Finlândia.

*Húngaro*
J. BAGHY, Budapeste, Hungria.
A. CSEH, Haia, Holanda.
Prof. Dr. K. KALOCSAY, Budapeste, Hungria.
Dr. F. SZILÁGYI, Boras, Suécia.

## OUTRAS LÍNGUAS

*Armênio*
Prof. Dr. G. G. SEVAK, Erevan, Armênia, U.R.S.S. (N).

*Chinês*
Dr. WONG KENN, Macau, China.

## LA NEPEREEMAJ

*Clarence Day*

La mondo de la libroj estas la plej grava kreado de la homo. Nenio, el ĉio kion li konstruas, daŭras pli ol tio.

La monumentoj falas; la nacioj pereas; la civilizacioj maljuniĝas kaj mortas, kaj nur post malluma periodo, aliaj generacioj novan civilizacion konstruas.

Sed en la mondo de la libroj estas verkaĵoj, kiuj trapasas multefoje tiajn periodojn, kaj tamen daŭras, novaj, vivoplenaj, eternaj, same kiel iam, okaze de ilia verkado. Ili ankoraŭ parolas al la bonaj koroj, pri koroj de homoj jam mortintaj antaŭ jarcentoj.

*Trad. C. C.*

---

La feliĉeco estas la dono juĝi sin feliĉa.

*Tobias Barreto*

---

*Grego*
Dr. A. STAMATIADIS, Atenas, Grécia.

*Inglês*
W. AULD, Dollar, Escócia (N).
M. C. BUTLER, Kingston-on-Thames, Inglaterra.
Prof. Dr. W. E. COLLINSON, Liverpool, Inglaterra.
W. J. DOWNES, Cullompton, Inglaterra (N).
D. B. GREGOR, Northampton, Inglaterra (N).

*Japonês*
Prof. N. KAWASAKI, Osaka, Japão.
T. NAKAMURA, Kyoto, Japão.
Prof. K. OSSAKA, Tóquio, Japão.

Os novos Membros estão assinalados por (N).

A Diretoria compõe-se dos Srs. Waringhien, Presidente, Collinson e Neergaard, Vice-Presidentes, e Albaut, Secretário.

## APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

### CAXIAS E A SUA TROPA

O Duque de Caxias, quando em campanha, fazia questão de sofrer as mesmas agruras e correr os mesmos riscos que os seus soldados. Uma tarde, em Lomas Valentinas, estava êle, completamente molhado, sob uma laranjeira, esperando o momento do ataque, quando uma ordenança se aproximou, trazendo na mão, com cuidado, uma fumegante xícara de café.

— Aqui está — disse — que o Sr. Dr. Bonifácio de Abreu mandou para V. Exa., e ordenou-me que não deixasse cair um só pingo no chão.

O marechal fitou-o, pausadamente.

— Eu não quero — respondeu, afinal.

E para o soldado, abrandando a voz:

— Beba-o você, camarada.

*Humberto de Campos*

*No próximo número daremos a tradução dêste trecho para que os estudiosos a comparem com o original.*

---

## PENSOJ

La plej bona rimedo venĝi al ofendinto estas ne sekvi lian ekzemplon.
(Marko Aŭrelio)

La malbona homo malutilas sin mem, kiam li intencas malutili la aliajn.
(Sankta Aŭgusteno)

La pento nur tiam estas vera, kiam oni ne faras plu tion, pri kio oni pentis.
(Lev Tolstoj)

Ĉiu nova deziro estas komenco de nova bezono, de nova malĝojo.
(Voltaire)

(El Literatura Aldono de revuo "Lingvo Internacia", 1904).

Trad. *Kabe*

# *LA BLUA BANTO*

*Romaneca novelo de*

## JÚLIA LOPES DE ALMEIDA

*Daŭrigo*

Ĉiuj maraj poŝtoj alportis leterojn de Raul. Lucila febrece malfermis ilin; sed tuj ombro de melankolio montriĝis sur ŝia vizaĝo, post ilia legado. La edzaj leteroj estis ĉiam leteroj de aminduManto, idealiganta bonaĵojn ne ĝuitajn, kvazaŭ ŝi estus ankoraŭ la virgulino *purega, neatingebla, senesperiga,* kiu aperadis al li en sonĝoj.

Ŝi inklinis sin al la opinio, ke tia saŭdado, tia nekonsolebla sufero estis la memoro pri ŝia fratino, konfuzita kun la ŝia, ĉe la edza cerbo. Apartenis al ŝia fratino la tremantaj manoj, kiuj evitis la liajn, kaj tiuj suspiroj apenaŭ antaŭsentitaj aŭ divenitaj...

Estis la mistero rilate sian fratinon, kiu konfuzis la saŭdadon de Raul al ŝi, lia edzino, la vera virino, la sola virino, alkroĉita al liaj brakoj, por ĉiam!

Kio mankis al la letero skribita al ŝia edzo, pri kio li tiamaniere plendis? Eĉ la larmon por makuli la inkon, per kiu ŝi en la fino de la letero skribis sian nomon, ŝi ne forgesis! Eble kio mankis sur ĝi, estis literoj skribitaj de Magdalena; kutiminta konfuzi la du fratinojn, li certe ne povus imagi unu sen la alia. Kaj nun? Magdalena restas en la Kolegio, ĉe la strato Matoso. Neniu fortiros ŝin el tie. Ŝi estas kvazaŭ entombigita.

Kaj pri ŝi? Ŝia edzo ne penetris la prudemon, per kiu ŝi anoncis al li la novaĵon, produkton de ilia kunvivado post la geedziĝo, aŭ ne kuraĝis ĝin kompreni... Tiel ŝi devos klare diri al li, ke baldaŭ ŝi fariĝos patrino. Teruro atakas ŝin, je la penso esti kreanta en sia sino, du estaĵojn tiajn, kiaj estas ŝi kaj ŝia fratino. Ŝi estas malgaje emociita kaj iom post iom malfortiĝas, ne dirante al iu la kaŭzon de tiu malviglîĝo. Nur dumnokte, sola en sia ĉambro, ŝi malŝarĝas per larmoj, la pezan, ĵaluzan koron. La palaco de la feliĉo trompis ŝin, kaj kiam ŝi transpaŝis ĝian sojlon, ŝi trovis interne de ĝi, same kiel la poeto, mallumon kaj silenton. Ankoraŭ plie, la konscienco akuzas ŝin pri la forlasita fratino, pri kies manko ŝiaj gepatroj ne ĉesas plendi. Ŝajnas, ke la domo estas forbalaita de la morto. Dum horoj oni ne aŭdas ian ajn voĉon. Ŝi vagadas tra la ĉambroj, senkonscie serĉante la ĝojon, kiu mankas al ŝi: la kunvivadon kun Magdalena... la ĉeeston de la edzo... kaj ne malofte ŝi perceptas en la maniero de agado de sia patrino, la rezignacion pri potenca doloro.

La monatoj fluis kaj la leteroj de Raul alvenis ĉiam arde flamantaj pro amo, ĝis ili mankis dum tri sinsekvaj alvenoj de vaporŝipoj. Lucila alarmis la familion. Malaperis ŝia atonio; ŝi forkonsumiĝis de zorgoj, formulis terurajn hipotezojn. Per telegramo al lia bieno, ŝi vokis sian bopatron, kvazaŭ por savi ŝin el danĝero.

D-ro Sergio Bastos rapide pretigis kofron kaj veturis per ekspresa vagonaro.

Lia bofilino sin ĵetegis sur liajn brakojn, kiam li alvenis. Kia diferenco inter la dolĉa Lucila, kiun li tie lasis, kaj la sinjorino, tre baldaŭ fariĝonta patrino, kiun li nun kisis!

Izidoro indulgis la timzorgemon de la filino, kiu alarmiĝis nur, ĉar ŝi ne ricevis tri aŭ kvar leterojn de Raul. Sed d-ro Bastos ankaŭ afliktiĝis, ĉar li estis ricevinta, la antaŭan nokton, leteron de sia amiko, kapitano de la ŝipo *Benjamin Constant,* en kiu ĉi tiu komunikis, ke Raul devis resti en la urbo Toulon, por sin kuraci de tifo.

Ĉiuj silentis, senkuraĝigitaj. D-ro Sergio havis intencon veturi per la plej proksima ŝipo; sed eble li ne trovus la filon vivanta! La kapitano sciigis lin pri la okazaĵo, nur la dek-duan tagon, post kiam la filo malsaniĝis! Lia amiko esperis, ke la malsano malprogresu, sed ĝi pligraviĝis. Ha! li bone memoris, kio estas tiuj Eŭropaj febroj. Sed lia filo Raul ĉiam estis sana junulo...

Kio konsternis la virinojn, estis la ideo pri hospitalo. Izidoro animis ilin:

— Por tiuj malsanuloj, estas pli oportuna iu malsunulejo ol privata domo. Ĉiokaze, ili estu trankvilaj...

Sed Lucila ne alkonformiĝis sin al la okazintaĵo. Ĝuste kiam devis finiĝi la vojaĝo; mankis nur du monatoj! Ha, ankaŭ ŝi volas iri kun sia bopatro. Ŝia loko estas tie, apud la malsanulo...

Sed oni memorigas ŝian staton, estos neeble vojaĝi... oni klopodas por inspiri kuraĝon al ŝi. D-ro Bastos kuradis

de la telegrafa oficejo al la vaporŝipaj agentejoj, kaj revenis ŝvitplena, ruĝa, kun sendormaj okuloj, ĉirkaŭitaj de violkolora rando, por resti apud la bofilino. Por la unua ŝipo, ne estas vakanta loko. Enhavebleco kompleta! Li insistis ĉe la agento. Li denove insistos, veturos iel ajn. Sed la pli frua ŝipo ekveturos nur post kvar tagoj, kaj li restos surŝipe, pli ol dek kvin tagoj, antaŭ ol povi ion scii pri la amata filo!... Kaj la sopirata respondo al lia telegramo, tiom prakrastita de la brazila konsulo, ankoraŭ ne alvenis! D-ro Bastos superŝutis, per krudaj vortoj, la konsulon.

Fine la bedaŭrinda konsulo respondis: — "Raul ĉe mi. Liberigita de danĝero. Atendu leteron".

D-ro Sergio jam trankviligita, konsiliĝis kun la familio. Li demandis, perpleksa, serĉante dividi la respondecon kun la aliaj: — Ĉu mi iros aŭ ne iros?

Kaj ĉiuj opiniis ke estas prudente atendi la anoncitan leteron.

Tamen Lucila iom post iom malfortiĝis. Ŝi ne sciis klarigi kion ŝi havas, la kompatinda! Ŝi ploradis sen ia konata motivo, ne dormis kaj fariĝis senpacienca.

Fine, ĉe bela frumateno naskiĝis la unua nepino de Izidoro Nunes. S-ino Angelika, plorante, ŝin prenis en siajn amemajn, tremantajn brakojn.

Lucila fartis ĉiam pli kaj pli malbone, indiferenta al ĉio, dormetante. Arda febro atakis ŝin. Tiam komencis movado en la domo, eniro kaj eliro de kuracistoj. Okazis kuracistaj interkonsiliĝoj, flegistinoj ne ripozis. Izidoro jam ne forlasis la hejmon. D-ro Bastos instalis sin, diligente servema, apud la lito de la malsanulino. Iun vesperon, kiam ĉiuj supozis ke ŝi, pli trankvila, komencis pli bone farti, lia bofilino faris la lastan spiron, milde, ŝajnante ekdormi...

Kaj jen la sekvantan tagon, alvenis letero de lia amiko konsulo, dirante: "Via filo obstinas tien vojaĝi, en la fino de ĉi tiu monato, kvankam la kuracistoj ne aprobas lian decidon; sed ili timas kontraŭstari lian volon, ĉar li estas ekscese nervoza. Zorgu eviti al li ian ajn emocion, ĝis li estos plene resaniĝinta. Post 30 aŭ 40 tagoj atendu lian alvenon".

(*Daŭrigota*)

*Trad. C. C.*

# 19-a Brazila Kongreso de Esperanto

**Rio de Janeiro 17/23 Oktobro 1965**

Nia 19-a Brazila Kongreso, kiu antaŭvidiĝas impona kaj fruktodona, okazos de la 17-a ĝis la 23-a de Oktobro 1965 en la kadro de la oficiala programo memoriga pri la 4-a Jarcento de urbo Rio de Janeiro.

Laŭ la Regularo por la Brazilaj Kongresoj de Esperanto estis nomitaj jenaj samideanoj, kiuj jam komencis agi:

### ORGANIZA KOMITATO

Prezidanto — Prof. D-ro João Baptista Melo e Sousa
Vicprezidanto — D-ro José de Arimateia Pinto do Carmo
Ĝenerala Sekretario — S-ro Luiz Alberto Brandão Martins
Unua Sekretario — S-ro Albertino Alves de Almeida
Dua Sekretario — D-ro Jaime Pereira
Unua Kasisto — F-ino Irani Baggi de Araujo
Dua Kasisto — S-ro Alfredo Ferreira da Costa e Silva

*Komisiono pri Informado*

S-ro Manuel Fernandes
Prof. Francisco Correia Neto
Kap. José Rabelo de Paula
S-ro Délcio Rodrigues Pereira

*Komisiono pri Akceptado*

D-ro Joaquim do Couto
S-ro Alfredo Maceira Rodriguez
S-ro João Olívio de Melo
F-ino Marta Seyr

*Komisiono pri Festoj kaj Ekskursoj*

D-ro Elio Rodrigues Lima
S-ro Lisarb Oliveira de Sousa
D-ro Carlos Doin
F-ino Nilda Inês Freire Rocha

La adreso de la O.K. estas tiu de B.E.L.

# BRAZILA KRONIKO

## BAHIA

*Santana* — Instituição Jesus Cristo sciigis, ke ĝia gimnazio "Edvaldo Flôres" jam enmetis en sian programon la lernofakon Esperanto.

## MINAS GERAIS

*Belo Horizonte* — La Grupo "Esperanto kaj Paco" (strato Bernardo Cisneiros, 12, Parque Riachuelo, Belo Horizonte, Minas Gerais) preparis kaj presigis belan poŝtkarton, kun la esprimo "Esperanto kaj Paco" en la precipaj 25 lingvoj nune uzataj en la mondo. Bonega ilo por la propagando de paco kaj Esperanto.

*Divinópolis* — Nia samideano Carlos Severo Neves (Drogaria Divinópolis) daŭrigas la propagandon de Esperanto kaj sciigas, ke la grava edukejo Instituto de Educação e Cultura de Divinópolis enkondukis en sian programon la lernadon de Esperanto.

## RIO DE JANEIRO

*Niterói* — Rádio Difusora Fluminense disradiis la programon "Esperanto", priskribante la historion de internaciaj lingvoj, ekde la Babela Turo ĝis la venkanta lingvo de L. Zamenhof. Direktis la aferon prof. Joaquim do Couto, de Niterói Esperanto-Klubo.

*Belford-Roxo* — Nia entuziasma samideano Israel Ramos de Avellar lernigas nian internacian lingvon en la Kurso Getúlio Vargas (strato Vicentina, 103).

## SAO PAULO

*São Paulo* — Dum la lasta semajno de Aŭgusto nia samideano Prof. J. B. Mello e Souza, tiam en São Paulo, estis invitita paroladi al la gelernantaro de du el la plej gravaj lernejoj de tiu granda ŝtata ĉefurbo: Lernejo "Rio Branco", subtenata de Rotary Klubo kaj "Alberto Conte" ŝtata lernejo en Santo Amaro. Prof. J. B. Mello Souza paroladis pri la problemo de Lingvo Internacia kaj ĝia solvo per Esperanto. La junularo de la grandaj lernejoj treege interesiĝis pri la temoj pritraktitaj kaj multaj el ili eldiris la deziron lerni Esperanton. En la du okazoj la paroladoj finiĝis per ĝenerala kantado de "Sankta Luĉio" kaj "Klamentino", en kies ĥoroj ĉiuj plezure partoprenis.

*São João da Boa Vista* — Niaj samideaninoj s-ino Elizabete Pacheco Suassuna, kaj f-ino Maria Emília Barboni klopodas por enkonduki la lernadon de Esperanto en la Gimnazion "Apóstolo Paulo". Niajn gratulojn kaj sukceson!

## SANTA CATARINA

*Corupá* — Nia samideano José Kormann komunikis la starigon de Esperanto-Klubo, kaj komencis fari elementan kurson por ĝiaj membroj.

### *AFORISMOJ*

Ju pli oni studas, des pli oni scias
Ju pli oni scias, des pli oni forgesas.
Ju pli oni forgesas, des malpli oni scias.
Ju malpli oni scias, des malpli oni forgesas.
Ju malpli oni forgesas des pli oni scias.
Do, por kio utilas studi?

*Ernest Hemingway*



17-5-910.

Caro Mello, grande sabedor de Esperanto

Saúde.

Tenho ahi na Secretaria do Interior um requerimento ao Ministro, pedindo exame de sanidade para poder jubilar-me. Está ahi parado. Peço-lhe o favor de apressar a marcha do papel para ser despachado pelo Ministro e se me marcar na Saúde Publica dia e hora p.ª o dito exame.

De seu velho ex-professor e amigo obr.º

Sylvio Romero.

Rua da Constituição, 34 – Ica

## *SÍLVIO ROMERO*

En la 18-a de Julio lasta oni celebris la 50-an jaron de la morto de la fama profesoro, filozofo kaj verkisto Sílvio Romero. Lia trafa frazo de la oficiala parolado en la 4-a Brazila Kongreso de Esperanto (Juiz de Fora — 1911) estas ofte ripetata: "Esperanto estas natura konsekvenco de la progresoj de la epoko. Ĝi aperis en la ĝusta momento kaj havas antaŭ si grandan estontecon."

La kliŝo montras interesan leteron, kiun Sílvio Romero skribis al nia pioniro Prof. D-ro J. B. Mello e Souza, tiam oficisto de la Ministerio de Justeco: en tiu letero li nomas nian samideanon "granda klerulo pri Esperanto" kaj petas lian helpon por la rapidigo de la proceso de sia emeritiĝo kiel Profesoro de Kolegio Petro II-a.

## 49.° CONGRESSO UNIVERSAL DE ESPERANTO

Realizou-se êste Congresso em Haia, Capital da Holanda, de 2 a 8 de agôsto de 1964. Inscreveram-se 2512 congressistas, de 45 países. Teve lugar a recepção em enorme sala do velho edifício Dierentuin.

A solene inauguração do Congresso foi imponente, no salão de *Kurkaus, Scheveningen,* belamente ornado de flôres de variegadas côres, no domingo, 2 de agôsto.

Em virtude da morte do presidente Prof. Yagi, prezidiu o vice-presidente, Sr. H. W. Holmes, fazendo eloqüente discurso.

Após, falaram os representantes oficiais de 9 países: Austrália, Áustria, Bélgica, Brasil, Alemanha, Espanha, Israel, Noruega; Nova Zelândia.

Funcionou como Secretário Geral o Sr. Günther Becker, atual secretário-geral de U.E.A.

Como sempre, a conferência do Prof. Ivo Lapenna, atual presidente de U.E.A., foi brilhante, muito aplaudida. Houve uma recepção oficial em Binnenhof.

Além das concorridas sessões de trabalho, ocorreram: Concurso de Oratória, Foto-Concurso, preleções da Universidade Internacional de Verão, Concurso Literário, Congressinho Infantil, Congresso de Cegos Esperantistas, cerimônias de culto católico e protestante, 2 reuniões da Academia de Esperanto, excursões, diversões noturnas, baile, banquete oficial. O Teatro Artístico Internacional representou seis peças teatrais.

Na sessão de encerramento do Congresso no dia 8 de agôsto, foi apresentada à congressista japonesa S-ra Isobe, a tradicional bandeira do Congresso, que deverá servir no 50.º Congresso Jubilar de Esperanto, no Japão.

### *Representação do Brasil*

Como em Congressos anteriores, o Ministério das Relações Exterores, a pedido da Liga Brasileira de Esperanto, designou um representante do nosso país. O nomeado foi o Sr. Heitor Pinto de Moura, primeiro-secretário da Embaixada do Brasil em Haia.

### *Brasileiro Premiado*

No Concurso de Literatura do 49.º Congresso Universal de Esperanto, realizado em Haia, em agôsto findo, alcançou o 1.º prêmio de poesia traduzida nosso ilustre samideano Leopoldo Henrique Knoedt, da Bahia, pela tradução *"Vojaĝantaj turtoj"*, da poesia *Pombos viajantes,* de Coelho Neto.

No próximo número daremos o original de Coelho Neto com a tradução premiada.

## 50.ª UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Tokio, Japanujo — 31-VII — 7-VIII 1965

Sub la alta protektado de D-ro Yuji Shibata, Prezidanto de la Japana Akademio.

La Loka Kongresa Komitato atentigas, ke la aliĝiloj disdonitaj dum la 49-a U.K. en Den Haag (blua koloro) estas eraraj. Validas nur la ĵus senditaj (flavaj koloroj).

Se vi amas, se vi preĝas, se vi suferas, vi estas homo.

(Hinda sentenco)

# INSULO DE L'AMO

*La senfina kvieteco*
*La ĉiam viva mildeco*
*Devenas el sonĝa dramo:*
*Estas tiel poetika,*
*Paquetá, la simbolika,*
*Vera "Insulo de l' Amo".*

*La romana historio*
*"Moreninha" estas io*
*El kie venis la famo;*
*Kortuŝema kaj aminda,*
*Iĝis por mi memorinda*
*Tiu Insulo de l' Amo.*

*Murmuro de la ondetoj,*
*Trilado de la birdetoj,*
*Jen tre sonora reklamo!*
*Kaj similas ja devizo:*
*Paquetá, ho Paradizo,*
*Vera Insulo de l' Amo!*

*Pro la natura bukedo,*
*La novelo de Macedo*
*Fariĝis ĉarma ornamo;*
*Ĉar, dank' al verkista saĝo,*
*Paquetá estas miraĝo,*
*Vera Insulo de l' Amo.*

*Certe, jen la fundamento*
*De mistika amambiento,*
*Kaj mistera panoramo:*
*Paquetá ĉiujn impresas,*
*Kaj neniu ĝin forgesas,*
*Ne, la Insulon de l' Amo.*

*Ĉe l' maro estas Princino,*
*Laŭ feliĉa determino*
*De fidela amikaro.*
*Bela insul' adorinda,*
*Paquetá, ĉiam mirinda,*
*Juvelo de Gvanabaro.*

*Recife, 1964*

*Thomaz Tenório Villa Nova*

# NEKROLOGO

*D-ro Benjamin Camazoto*

Mortis la 4-an de majo 1964, en Pôrto Alegre, Ŝtato Rio Grande do Sul, 79-jaraĝa, nia samideano Benjamin Camozato, dentkuracisto kaj gazeta kunlaboranto. Li fondis E-grupon en Lajes, Ŝtato Santa Catarina; en Florianópolis, la Societon Sankta Katarino (1907) kaj la "Sudbrazilan Esperantistigilon" en Pôrto Alegre (1927). Li estis direktoro de la revuo "Brasil Filatélico", kiu publikigis artikolojn en kaj pri Esperanto. En Porto Alegre li plenumis dum multaj jaroj la oficon de Fak-delegito de UEA pri Filatelio.

Li estis unu el la malmultaj brazilanoj, kiuj persone interkonatiĝis kun Zamenhof; tio okazis dum la 4-a Universala Kongreso, en Dresden (1908), kiun li ĉeestis kiel reprezentanto de Brazilo. Post multaj jaroj li denove partoprenis en Universalaj Kongresoj — en Bournemouth (1949) kaj en Parizo (1950).

Li lasis vidvinon kaj tri gefilojn al kiuj ni esprimas niajn sincerajn kondolencojn.

*Wanda Siedlecki*

Forpasis en Curitiba, la 20-an de de aŭgusto, Wanda Siedlecki, filino de nia jam mortinta samideano Casimiro Siedlecki.

**Grande obra original de Zamenhof**

**ORIGINALA VERKARO**

**Prefácios, artigos, tratados, discursos, cartas, poezias — coligidos e ordenados pelo Dr. J. Dietterle. Enc. .... 51 st.**

# BIBLIOGRAFIO

*Francisco Cândido Xavier* — *Ago Kaj Reago* — Diktita de la Spirito de Andreo Ludoviko. El la portugallingva originalo esperantigita de L. C. Porto Carreiro Neto. 233 p. 1963. Federação E. Brasileira, Av. Passos 30, Rio de Janeiro.

Verko pri faktoj ekster la sfero de nia Planedo.

*El Ĉina Fotografia Arto* — Kompilita de la Redakcio de "Ĉina Fotografio" — Ĉina Esperanto-ligo, Pekino, 1963.

Interesa albumo em kiu estas kolektita nombro da eminentaj verkoj faritaj de ĉinaj fotistoj, de post 1949, kun tre diversaj temoj kaj malsamaj stiloj, kiuj povas doni ĝeneralan bildon pri la fotografia arto de la nova Ĉinujo.

*Jean Rostand,* membro de la Franca Akademio — *Tio, Kion mi Kredas*. El la franca tradukis *Pierre Berlot*. 39 p. 1962. Unuiĝo Franca por Esperanto-34, rue de Chabrol, Parizo.

En tiuj paĝoj la konata franca sciencisto "Klopodas diri kiel eble plej simple kaj klare tion, kion mi kredas, atinginte la sesdekan jaron".

*Jean Ribillard* — *Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud* — Libro originale verkita en Esperanto. Redaktita de *Reto Rossetti* — Kun antaŭletero de R. Fiquet. 144 p. 1963 — J. Régulo, eldonisto. La Laguna.

Aŭtobiografio de filizofia azeno. Literatura testamento de la aŭtoro, mortinta en Polinezio, antaŭ ol fini la verkaĵon.

Eleganta stilo, pitoreska lingvaĵo, satira, bonhumora, sed ne facile legebla de komencantaj esperantistoj.

*Stellan Engholm* — *Homoj sur la tero* Romano. Dua eldono. Skizo enkonduka de F. Szilagyi. 236 p. 4 bildopaĝoj 16,5 x 22,5 cm. J. Régulo, eldonisto — La Laguna 1963.

La unua eldono estis de *Literatura Mondo,* kiel premiita verko en Literatura Konkurso (1931). Leginda verkaĵo, kun klara, simpla stilo, mallongaj frazoj. La sveda aŭtoro, unu el la plej gravaj nomoj de nia literaturo, mortis en 1960.

*G. E. Maura* — *Duonvoĉe* — dua eldono, 179. p. Poezia libro originale verkita en Esperanto. Kun 3 desegnoj de Raymond Moretti. Kovrilo de *David H. Young*. J. Régulo, Eld. La Laguna — 1963. Ĉapitroj: amoro, amaro, humaro, dum iro, ekfotoj laŭ la vojo — notoj eventualaj, gloroj.

*Moderna Pekino* — Kompilita de la Oficejo por Planado de Urba Konstruado de Pekino. Ĉina-Esperanto Ligo 1963.

Bela ŝatinda albumo. Bildojn vere imponajn ĝi montras. Aro da publikaj konstruaĵoj, universitatoj, gimnazioj, kolegioj, muzeoj, stacioj, placoj, hospitaloj, hoteloj, ĝardenoj, larĝaj stratoj, uzinoj, laborejoj, parkoj, pontoj, kvartaloj, aerodromo.

*Bulgarino* — Eldonaĵo de la Komitato de la Bulgaraj Virinoj. Bulv. Patriark Evtimij 82, Sofio. Interesa multilustrita verkaĵo pri la bulgaraj virinoj.

*Gaja leganto per Esperanto* — Dua eldono, 47 paĝoj — Eld. The Esperanto Publishing Company Ltd. — Anglujo. Verkita kaj kompilita de P. E. Schwerin. Spritaĵoj, vortludoj, anekdotoj, rimaĵoj, humoraĵa legado.

*Muzilo* — Kajero n.º 1 — *Prof. H. Paruzel*. Eldonis: Muzilo, Frederikstraat, 2, Dordrecht, Nederlando.

Muzilo estas nomo de muzika skribo, prenita el la lingvo Esperanto. Ĝi signifas "instrumento de Muzoj nome de la Muziko kaj Kanto".

*Perspektivoj* — *Aperturoj por la menso kaj por la koro*. France verkis Fernando Lelotte, S.J. En Esperanton tradukis Fr. Leotado De Ruyvez, F.C. Reviziis H. G. Wannemakers, S.J. Eldono de Fratoj de l' Karito, Int. S. Kamilo, Biebeek (Belgujo) 58 p. 1963.

*Bonvenon al Oslo* — Turistbroŝuro en Esperanto, priskribanta la vidindaĵojn, ĉirkaŭaĵojn, banlokojn de la ĉefurbo de Norvegujo. Senpage ricevebla de Norvega Esperantista Ligo, Boks 942, Oslo, Noruegujo.

*Evangelia serio de "La Esperanta Misio"*, (Ostansjo, Svedujo): Margauta Marmgren: Preĝo SOS kaj Sekureco. Trad. el la sveda. La Provo de Fido — Prediko de Alvar Blomgren. Zorgo kiu liberigas. — Dubo kaj Kredo. — Timo pro kio? — Ĉio kun Li.

*U.E.A.* — *Centro de Esploro kaj Documentado* — Londono. 4 — Jes, Esperanto estas la respondo al la Monda Lingva Problemo — de Ivo Lapenna. 5 — Rimarkoj pri la Esperanto-Simpozio — de Mario Pei. — 6 — Konklude — de Ivo Lapenna.

*L. L. Zamenhof* — *Fundamento de Esperanto*. Esperantaj Francaj Eldonoj,

notoj kaj lingvaj rimarkoj de d-ro *A. Albaut*, membro de la Akademio de Esperanto. Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande, Francujo, 355 p. 1963.

Enhavo de tiu bonega libro: Fundamenta Gramatiko de Esperanto en 5 lingvoj kaj Akademiaj Korektoj, Ekzercaro, Universala Vortaro, Lingvaj Rimarkoj.

*Edmond Privat — Aventuroj de Pioniro* — Libro originale verkita en Esperanto. Enkonduka noto de Henri Vatré. Personaj rememoroj de Edmond Privat, depost 1906. Stefeto-Beletraj Kajeroj — J. Régulo, Eldonisto, La Laguna. 143 p. kun 21 bildoj.

*Ĉi vi ŝatus Orbitri?* Tiu ĉi ludilo konsistas el 58 kartetoj, kiuj surhavas demandojn kaj respondojn zorge elektitajn por doni trafajn kaj amuzajn respondojn je iu ajn el pli ol 800 eblaj kombinoj. Eldonita de Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado.

*"Internacia Elparolo"* — Nova nerompebla gramofondisko: Kun legaĵoj de Milan Sudec, Marianne Vermaas, Glauco Pompilio, Willem Schmid. Prezento de Victor Sadler. Daŭro 15 minutoj — Rapideco 33 1/3 r.m.

*CENT JAROJ DE MATÍCA SLOVENSKA*. 1863-1963. *A. Matovcik kaj P. Liba*. 30 paĝoj. Tradukis Esperanto Rondeto en Martin-Ĉekoslovakio.

### *Kemia nomenklaturo*

Nia samideano Cicero Pimentel skribis kaj publikigis en la sciencaj revuoj "Publicações Farmaceuticas" kaj "Revista de Química Industrial" (Ŝtato S. Paulo) interesajn artikolojn pri kemia nomenklaturo Esperanta de silikonoj (organaj polisiloksanoj) kaj de derivaĵoj (saloj kaj kombinaĵoj) el kalio, natrio, arseno, hidrargo.

### *La Marvirineto*

El la fabeloj de H. C. Andersen, "La Marvirineto", unu el la plej ŝatataj, aperis Esperantlingve ĉe eldonejo KOKO (Kolby Kaas, Danlando) en traduko el la dana originalo, kun lukaj kolorilustraĵoj kaj eleganta bindo.

## ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

*Bulgária* — O Ministério da Educação resolveu que se organizem cursos para o ensino da língua internacional nas escolas de grau médio, segundo o programa apresentado pela Búlgara Esperanto-Asocio.

*Camboja* — Uma fábrica de bebidas em Pnom-Pehn prepara nova fórmula de água de Seltz, à qual deu a denominação esperantista *"Mirinda"*.

*Espanha* — Foi criada oficialmente a cadeira de língua Esperanto na Universidade de Laguna, Canárias. Dirige-a o nosso ilustre samideano Prof. J. Régulo Perez.

*Hungria* — Atendendo a petição subscrita por mais de 100 estudantes, o Reitor da Universidade de Szeged permitiu o ensino do Esperanto nas faculdades da Universidade, como já o fêz a respeito de outras matérias, em 1963-64. Dois professôres já foram nomeados para isso.

*Índia* — A enciclopédia da Academia Literária de Bengala, na nova língua bengali, terá artigos sôbre Esperanto e sôbre L. L. Zamenhof.

*Israel* — A Liga Esperantista de Israel resolveu fundar uma Editôra Cooperativa. A primeira edição planejada é a "Hebrea Antologio" (Antologia Hebráica) em Esperanto, traduzida e organizada pelo esperantista J. Kohen-Cedek.

*Noruega* — Foi publicado há pouco o Grande Dicionário Norueguês — Esperanto, cujos autores são R. Rian e E. A. Hongen.

*Polônia* — Na Biblioteca Universitária de Lodz, onde já funciona o Esperanto-Lektorato, foi solenemente inaugurada a Seção-Esperanto.

Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj organiza uma Campanha Internacional Científica de Estudantes, cujo fim é contribuir para ampla permuta de pensamentos, pontos de vistas, experiências e aquisição de ciência e técnica e de material para êsse fim, entre estudantes de todo o mundo. *Torun*, strato Moniuszki 16-20 DSS *Pollando*.

# BRAZILA KLUBO "ESPERANTO"

FONDITA EN LA 29-a DE JUNIO 1906

LA LOKA GRUPO DE LA URBO RIO DE JANEIRO — PRAÇA DA REPÚBLICA, 54 — TEL.: 42-4357 — MALFERMITA EN LA LABORTAGOJ DE LA 8-a ĜIS LA 18-a KUNVENOJ: SABATE DE LA 14-a ĜIS LA 18-a

ELEIÇÃO DA DIRETORIA — Em Assembléia Geral Ordinária realizada no dia 4 de julho do corrente ano o Brazila Klubo Esperanto elegeu a seguinte diretoria para o biênio 1964-1966: Presidente: Prof. João Baptista de Mello e Sousa; Vice-Presidente: Dr. José de Arimatéa Pinto do Carmo; Secretário Geral: Cel. Jorge Campos de Oliveira; 1.º Secretário: Dr. José Antônio de Albuquerque; 2.º Secretário: Sr. Alfredo Maceira Rodriguez; Tesoureiro: Dr. Hamilton Cunha Kozlowski; Bibliotecário: D. Floripes Mendes Castilho; Conselho Deliberativo: Sr. Getúlio Soares de Araújo, D. Irani Baggi de Araújo, Sr. Manoel Alves Carneiro, Dr. Carlos Domingues, Sr. A. Wantuil de Freitas, Sr. Alvaro Henrique Lima, D. Maria do Amaral Malheiro; Sr. Joel Vasques Manso, Gen. Geraldo A. Gomes de Pádua, Dr. Floriano Negreiros de Vasconcelos Pessoa, Dona Martha Seyr e Sr. Alfredo Ferreira da Costa e Silva.

DATREVENO DE B.K.E. — En la kunveno de la 4-a de Julio oni festis la 58-an datrevenon de B.K.E. Post la elekto de la estraro okazis la disdono de diplomoj kaj fine literatura parto kun legado de kelkaj artikoloj aperintaj en la unua numero de Brazila Esperantisto. Estis reliefigita la laboro de la unua estraro de la Klubo, elektita en 1907: Everardo Backheuser, prez.; Nuno Baena, 1-a vicprez.; Nerval de Gouveia, 2-a vicprez.; Lauriano das Trinas, sek. kaj Honorio Leal, kasisto.

KURSO — Nia samideano Manoel Alves Carneiro, "profesoro aprobita" laŭ la normoj starigitaj de la Akademio de Esperanto kaj membro de la Decida Konsilantaro de B.K.E. instruas Esperanton ĉe *Congregação Espírita João Evangelista* ĉiusabate de la 16-a ĝis la 18-a h. La kurso komenciĝis la 2-an de Marto.

SHAKESPEARE — La fama ĵurnalo *O GLOBO* de ĉi tiu urbo publikiĝis en sia n-ro de 16-5-64 en la sekcio Ciência e Cultura (Scienco kaj Kulturo) artikolon, kiun ni transskribas ĉisube:

*Comemoração no Brazila Klubo Esperanto do 4.º Centenário de Shakespeare*

William Shakespeare, cujo 4.º centenário está sendo comemorado em todo o mundo, é um dos escritores mais traduzidos para a língua internacional. Vários esperantistas inglêses se têm especializado nesta matéria, notadamente Stephen A. Andrew. Também o autor do Esperanto, Zamenhof, fêz uma tradução do *Hamlet*, que no consenso dos entendidos é considerada magistral. Outras obras de Shakespeare vertidas para o Esperanto são: *A Tempestade, Júlio César, Macbeth, O Mercador de Veneza, Sonho de Uma Noite de Verão, Rei Lear, Antônio e Cleópatra, As Alegres Comadres de Windsor. Como Vos Aprouver, Romeu e Julieta, Tróilo e Cressida e Otelo.*

O Brazila Klubo Esperanto dedicará a sua sessão semanal a realizar-se hoje, às 16 h, na sede social, Praça da República, 54 - 2.º, ao grande dramaturgo inglês. O presidente do Clube, Prof. João

Batista Melo e Sousa, antigo catedrático de literatura do Instituto de Educação fará uma preleção sôbre a vida e a obra do poeta, detendo-se particularmente na análise de *A Tempestade*. O Dr. Luís Alberto Martins, o Dr. Joel Vasques Manso e o Sr. Cláudio Spinelli declamarão monólogos do *Hamlet*, do *Otelo* e do *Rei Lear*, respectivamente. Outros associados lerão breves resumos em esperanto das peças traduzidas para essa língua.

PORTO CARREIRO NETO — La estraro partoprenis en ĉiuj funebraj omaĝoj. La kunsido de la 25-a de Julio estis dediĉita al lia memoro: S-ro Alfredo Ferreira da Costa e Silva legis la antaŭparolon de Dicionário Português-Esperanto, artikolon verkitan de Porto Carreiro; S-ro Francisco de Assis Torres deklamis poezion verkitan de li pri la morto de Couto Fernandes; kaj diversaj aliaj anoj legis partojn de la artikoloj, kiuj aperis en *Brazila Esperantisto* sub la rubriko *Perfektigu Vian Scion*. La prezidanto de la kunsido, Kolonelo Jorge Campos de Oliveira, esprimis la doloran senton de la klubo pro la morto de sia eminenta membro.

## DONACO

Por nia sidejo F-ino Aracy Baggi de Araujo kaj F-ino Irani Baggi de Araujo, kasistino de BEL faris jenan utilan donacon, kiun ni ricevis kun danko: portebla skribmaŝino, ŝranko, brakseĝo por biblioteko, kuŝoseĝo kaj 12 paperujoj.

## HOMOJ kaj BESTOJ

Homoj estas la solaj, en la mondo,
Kiuj pro hont' sin kovras per vestoj,
Sed ĝuste homoj agas sen honto
Pli ol ĉiuj senvestaj bestoj.

*Armand-Su, Tjencino*
("Oomoto", Sept. Okt. 1963)


# INTERNACIA MONDLITERATURO

*Jóias da literatura mundial*

*Cada número da coleção*: 3 st.

1. *Hermano kaj Doroteo*. Goethe (Küster).
2. *Legendoj*. Niemojewski (Kuhl).
3. *Elektitaj Noveloj*. Turgenev (Mexin).
4. *La Nigra Galero*. Raabe (Wicke).
5. *El la "Camera Obscura"*. Hildebrand (Mees).
6. *El la Skizlibro*. Irving (Elvin).
7. *Petro Schlemihl*, Chamisso (Wüster).
8. *Nuntempaj Rakontoj*. Stamatov (Krestanoff).
9. *Esgotado.*
10. *Tri Noveloj*. Puŝkin (Fiŝer).
11/12. *Deklaracio*. Ariŝima (Tooguu).
13. *Ses Noveloj*. Poe (Milward).
14. *La Firmao de la Kato, Kiu Pilkludas*. Balzac (Benoit).
15. *Orientaj Fabeloj*. Doroŝeviĉ (Hohlov).
16. *Noveloj* Sienkiewicz (Lidja Zamenhof).
17. *Insulo de Feliĉuloj*. Strindberg (Frode).
18. *Barbaraj Prozaĵoj*. Bertrana (Casas).
19. *Ano de l'Ringludo*. Ŝimunoviĉ (Janjiĉ).
20. *Servokapubla. Marcus Tybout*. Eekhoud (Bergiers).
21. *Nobela Peko. Sadoveanu* (Morariu).

1 st. = Cr$ 200 (Dez. 64).

**PRIVILEGIA VOJO**

V. Setälä

**O livro recomendado pela U.E.A. para o ensino universal pelo método direto. Com folha suplementar de instruções em português. Ilust.: ............ 10 st.**

# ESPERANTISTA VIVO

## ORA JUBILEU

Celebris la 16-an de septembro la 50-jaran geedziĝjubileon nia sindona samideano Octavio Vianna Peixoto kaj lia edzino Escorites Cortines Peixoto, en Ŝtato Rio de Janeiro.

Al la edza paro, al la indaj gefiloj kaj genepoj ni prezentas korajn gratulon kaj bondezirojn.

## GEEDZIĜO

Ni kore gratulas nian samideanon Antônio de Pádua Soares pro lia edziĝo kun fraŭlino Evangeline Maria la 25-an de julio 1964, en la urbo Picos, Ŝtato Piauí. Multe da feliĉo al la nova geedza paro.

# LA PATRINETO

— Kie estas patrineto?
Diru, paĉjo mia!
Kion faros la knabeto
Nun sen panjo sia?
Mi ja vidis ŝin kuŝantan
Tie, ho Patreto!
Ĉu vi ĝin ne volas diri,
Kie mi ŝin trovos?
Mi ŝin serĉi volas iri,
Kien mi nur povos!
— Nur ne ploru, infaneto,
Mi ja ĉion diros:
Panjo mortis, ho fileto;
Vi nenien iros.

*Franjo Modrijan*

(El *Cursus Completus Esperanti*)

# *DEVENO DE LA NOMO DE KELKAJ JUVELŜTONOJ*

*AGATO* — El la greka kaj latina vorto *Achates* — nomo de Sicilia rivero, kie oni ĝin trovis.

*AMETISTO* — El la greka vorto *amethystos* (ne ebriiga).

*BERILO* — El la latina *berillus* (*greka beryllos*).

*DIAMANTO* — El la greka *adamas* (nebridebla, nevenkebla).

*GRENATO* — El la latina *granatum.*

*JADO* — El la franca *jade.*

*KRIZOBERILO* — El la greka lingvo: *chrysos,* (oro) — *beryllos.*

*OPALO* — El la sanskrito *upala,* pere de la greka *opallios* kaj la latina *opalus.*

*RUBENO* — El la latina *ruber* (ruĝa).

*SAFIRO* — El la hebrea *sappir,* pere de la latina sapphirus, de la greka *sappheiros.*

*TOPAZO* — El la greka *topázio,* pere de la latina *topazium.*

*TURKIZO* — El *turkish,* pere de la franca *turquoise.*

*TURMALINO* — El la cejlona lingvo *turamali.*

*ZIRCONIO* — El la persa lingvo *sargun* (orkolora).

*C. C.*

ESPERANTA PORTUGALA PROVERBARO. *Zamenhof — C. Fernandes.*
AMO PER PROVERBOJ. *A. Azevedo. Tr. C. Fernandes.*

Índice alfabético nas duas línguas
Cr$ 1.200

# SKOLTA MOVADO

## HELPANTOJ SERĈATAJ

En la lastaj jaroj la kresko de la Skolta Esperantista Ligo iom stagnis. La manko pri kunlaborantoj en diversaj landoj kulpas pri tio.

Por komenci la laboron en ia lando, ni bezonas almenaŭ unu persononon en ĉiu lando kiu sin interesas pri nia Ligo, kaj eĉ tiu kelkfoje ne ekzistas.

Ĉiu persono kiu konas skoltojn en sia ĉirkaŭaĵo, povas helpi nin. Por faciligi la laboron ni pretigis laborplanon kun sugestoj kiel bonvola persono povas estis utila por la enkonduko de nia lingvo en la vastan internacian Skoltan Movadon.

Simpla karto kun nomo kaj adreso sufiĉas por ricevi informojn pri la maniero en kiu vi povas kunlabori.

Respondu al: J. K. Hammer, Wibautstraat 33, Zaandam, Nederlando.

Ni intencas starigi samtempan agadon en pluraj landoj, laŭ bone elpensita programo.

Por certigi pli la sukceso S.E.L. preparis la eldonon de trikolora afiŝo.

Eventuale S.E.L. eldonos plurlingvan faldfolion se tio montriĝos utila.

En 1968 S.E.L. festos sian oran jubileon. Inter la jaroj 1939 — 1945 ĝi perdis multajn membrojn kaj pro la granda brita influo en la skolta movado la re-akiro estas nefacila tasko.

# LULSEĜO

Estas vere bedaŭrinde, ke en la lastaj tempoj la lulseĝo preskaŭ ĉesis esti kutima apartenaĵo por la memblaro de la familiaj restedejoj. Antaŭ kelkaj jaroj la lulseĝo fariĝis meblo praktike deviga en ĉiu domo, kie oni facile trovis unu, kaj eĉ kelkfoje pli ol unu, plurajn.

Maljunuloj, same kiel junuloj, havis la utilan kutimon sin balanci sufiĉe da tempo, tial ke la lulseĝo konsistigis simbolon de hejma ripozo.

Kelkaj personoj atribuas la kreskantan mankon de uzo de tiu tipa seĝo al tio, ke ĝi okupas grandan pacon. Sed tia maloportunaĵo estas facile evitebla, se oni uzas malaltan modelon, kia tiu por infanoj; tamen sufiĉe ampleksa por plenaĝulo sidi komforte.

La uzo de la balanca seĝo defalis, ĉar ni perdadas la kutimon hejme ripozi. Ni preferas aŭtomobile kuri tra la vojoj aŭ eniĝi en kinejojn.

Ekde la lulilo ĝis la tombejo ni vivadas rapidege kaj forgesas, ke la remeto de la lulseĝo en niajn hejmojn estiĝas almenaŭ malplimultigon de arteriaj korpremecoj kaj aliaj koropatioj.

Eble nuntempe la radiodissendoj kaj la televido iom pligrandigos la hejman restadon.

*C. C.*

### LA SANKTA BIBLIO

**Trad. do original por Zamenhof.**

**Enc.** .................... **22 st.**

### LIBREJO ZAMENHOF

*Librejo Zamenhof* estas la nomo de la librovendejo, kies posedanto, Paulo Guilherme, starigis ek de januaro, en la urbo Bagé, ŝtato Rio Grande do Sul (poŝtkesto) 369).

# LINGVOJ

La lingva problemo tute ne estas nova. Laŭ lingvaj fakuloj ekzistas en la tuta mondo 2796 vivantaj lingvoj, inter ili 13 kiujn parolas po pli ol 50.000.000 homoj.

Multaj nacioj komence devis decidi pri difinita lingvo. La persa lingvo fariĝis en la jaro 1067 la oficiala lingvo de la lando; la nederlanda lingvo, komence de la 14-a jarcento; la hispana en la jaro 1493; la rusa, komence de la 16-a jarcento; la ĉina, en la jaro 1920; la araba, en la jaro 1956 por Sudano; kaj en la jaro 1962 nun Tanganjiko bezonas oficialan lingvon.

(El "Esperanto Katolika", novembro 1962).

# BONHUMORO

— Kia vi trovis hieraŭ la sciencan prelegon?

— Nu, miaopinie, ĝi estis sufiĉe seka, malgraŭ la multaj fontoj el kiuj ĉerpis la prelegisto.

Anna: — Ĉu vi demandis, kion paĉjo deziras kiel naskiĝtagan donacon?

La patrino: — Li nenion deziras... li diras, ke li ne havas monon.

(El "Hungara Esperantisto")

## ESPERANTA LEGOLIBRO

Migliorini

4.ª edição revista e aumentada 3 partes: Tra la Vivo; Tra la Lingvo; Tra la Literaturo.

Obra recomendada pelo Instituto Italiano de Esperanto.

10 st.

# EL "SINTROMPOJ"

Pri politiko, socio kaj religio ekzistas opinioj, maksimoj kaj celoj, kiujn aprobas centoj, miloj, eĉ milionoj da homoj — kredante, ke ili havas siajn proprajn firmajn principojn, kvankam ili pensas, diras kaj faras nur tion, kion ĉiuj, precipe la regantoj kaj direktantoj de la tempo pensas kaj faras. Kien la tendenco de nia epoko irigas, tien — kiel konate — la homamaso kuras. La ekzemplo de aliaj anstataŭas propran principon, la modo anstataŭas bonguston.

J. B. Kirscher

## PARA O ENSINO PELO MÉTODO DIRETO

| | |
|---|---|
| **Privilegia Vojo,** Setälä. Recomendado por U.E.A. para os cursos em todo o mundo ...... | 10 st. |
| **Esperanto Série Pedro II.** Edição da Liga Brasileira de Esperanto. Quadros para aquisição de vocabulári o ............... | Cr$ 200 |
| **Konversacia Literaturo,** Cseh. 8 folhetos ................... | 8 st. |
| **Konversacia Vortaro Amuza,** Cseh ...................... | 2 st. |
| **Ekzercaj Taskoj Post Daŭriga kurso,** Cseh. 6 folhas .......... | 2 st. |
| **Popularа Lernolibro de Esperanto,** Kökény. Método internacional para principiantes ...... | 6 st. |
| **Esperanto Lernolibro por Popollernejoj,** Degen. Com ilustrações coloridas ............... | 6 st. |
| **Tra la Jaro,** Lucy E. Waddy. Para principiantes de todos os países. ...................... | 5 st. |
| **Esperanto por Infanoj,** G. Solomon ........................ | 6 st. |
| **Ekzercilo-Helpilo,** Mazzolini. Para curso prático superior ... | 9 st. |

1 st. = Cr$ 200 (Dez. 1964)

## Série "EPOKO"

*Cada número da coleção* ....... 8 st.

1. *Esgotado.*
2. *Esgotado.*
3. *La Princo kaj Betty.* Wodehouse
4. *La Tempo-Maŝino. Lando de la Blinduloj.* Wells (Amos).
5. *Princino de Marso.* Burroughs (Sturmer).
6. *Colomba.* Merimée (Beau).
7. *Sep Vangofrapoj.* Aszlányi (Spierer).
8. *La Virineto en Bluo kaj aliaj rakontoj.* Stuttard.
9. *Brulanta sekreto kaj aliaj rakontoj.* Zweig (K.R. e P.E. Schwerin).
10. *Kiso de la Reĝino.* Naĵivin (Staritsky).
11. *La Karnavalo kaj la Somanambulino.* Immermann (Wohlthat).

## MUUSSES ESPERANTO - BIBLIOTEKO

*Cada número da coleção* .... 2 st.

1. *Esgotado.*
2. *Rusaj Noveloj.* Lermontov e Mamin-Sibirjak (Filatov).
3. *Esgotado.*
4. *Tra Usono Kun Ruliĝanta Hejmo.* Scherer.
5. *Esgotado.*
6. *Esgotado.*
7. *Esgotado.*
8. *La Avo.* Petöfi (Spierer).
9. *La Jusnaskito.* Bengoa (Berenguer).
10. *Jubilea Kongreso en Krakovo (1912).*
11. *Paraladoj de la Ora Jubilea Kongreso.* (Glück).
12. *Nordnordaj Fabeloj.* Thézard.
13. *En la vagono kaj aliaj rakontoj.* Ŝirjaev.

14/15. *La Problemo de Internacia Lingvo.* Collinder.

16. *Rozinjo.* Török (Kalocsay).
17. *El la Londona Skzlibro.* Dickens (Whadham).
18. *Flugado Alimonden.* Dodge.
19. *Patro kaj Filo.* Jovkov (Iskrov).

## REVISTAS

**Assinatura anual**

| | Steloj |
|---|---|
| **Amerika Esperantisto** | 38 |
| **Boletin** | 17 |
| **British Esperantist, The** | 30 |
| **Dia Regno** | 28 |
| **Esperanto (U.E.A.)** | 60 |
| **Espero, La** | 42 |
| **Espero Katolika** | 28 |
| **Franca Esperantisto** | 36 |
| **Geografia Revuo** | 17 |
| **Heroldo de Esperanto** | 40 |
| **Kontakto** | 32 |
| **Monda Kulturo** | 60 |
| **Nord-Amerika Esperanto-Revuo** | 42 |
| **Norda Prismo** | 36 |
| **Oomoto** | 18 |
| **Praktiko, La** | 40 |
| **Revuo Orienta, La** | 30 |
| **Scienca Revuo** | 30 |
| **Sennaciulo** | 30 |
| **Sennacieca Revuo** | 9 |
| **Skolta Mondo** | 6 |
| **Suda Stelo, La** | 30 |
| **Svisa Espero** | 18 |

**1 Stelo = Cr$ 200 (Dez. 64)**

## TRA LA MONDO

**Curso de Esperanto em discos composto pe :**

**a) — livro com 48 leituras variadas.**

**b) — série de 6 discos, cada face dos quais gravada por esperantista dos países seguintes: França, Itália, Alemanha ,Holanda, Finlandia, Jugoslávia, Polônia, Marrocos, China, Japão, Inglaterra, Estados Unidos.**

**c) — Compêndio da gramática do Esperanto. ............... 245 st.**

**QUO VADIS. — romance do tempo de Nero. H. Sienkiewicz. Primorosa tradução Lidia Zamenhof 32 st.**